*****************************************************************************

INSTRU-CIRKULERO 2009/1 (marto 2009)

Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj

*****************************************************************************

Enhavo:


| | |
|---|---|
| 1: AGEI-jarĉefkunveno | 6. Kursoj, studsesioj |
| 2. Membraro | 7. Libroj, gazetoj |
| 3. Nova retpaĝaro | 8. ILEI-konferenco |
| 4. Diskutlisto | 9. Interlingvistikaj studoj |
| 5. KER-ekzamenoj | 10. TORPEDO-5 |


## 1. INVITO AL AGEI-JARĈEFKUNVENO

La jarĉefkunveno de la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI) okazos dum la Germana Esperanto-Kongreso (samtempe Eŭropa Esperanto-Kongreso) GEK-EEK en Herzberg am Harz, Niedersachsen, dum Pentekosto, inter 28.05-03.06.2009:
Bv. ne forgesi ĝustatempe aliĝi. Vian aliĝilon sendu rete
http://gek-eek.esperanto-urbo.de aŭ rekte al zsofia.korody@esperanto.de
Per poŝto al Zsofia Korody, 37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6

Jen invitilo por nia membraro:

Sehr geehrte Mitglieder,

hiermit lade ich statutengemäß zur Mitgliederversammlung am 30.05.2009 (Samstag) 14:00 in 37412 Herzberg am Harz/Niedersachsen. Ort der Versammlung: Ernst-Moritz-Arndt-Gymnasium E.M.A.-Gymnasium, Domeyerweg 5
Vorgesehene Tagesordnung:
TOP 1: Wahl des Sitzungsleiters., Begrüßung und Eröffnung. Wahl des Protokollanten. Feststellen der ordnungsgemäßen Einladung und Beschlussfähigkeit.
TOP 2: Feststellen der Tagesordnung.
TOP 3: Bericht des Vorstands. Entlastung des Vorstands.
TOP 4: Kassenbericht. Bericht der Rechnungsprüfer.
TOP 5: Verhältnis zu der Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)
TOP 6: Sonstige Aktivitäten und Anträge, soweit bis zur Sitzung eingereicht
TOP 7: Ort und Zeit der nächsten Mitgliederversammlung
TOP 8: Verschiedenes

Neben Berichten über die Arbeit des vergangenen Jahres sind Diskussionen über die weitere Arbeit des Verbandes zu erwarten und ausdrücklich erwünscht, der Vorstand erhofft daher eine rege Teilnahme der Mitglieder.

Herzlich willkommen!
Zsófia Kóródy (Vorsitzende)

Jen kelkaj gravaj informoj:

**2. MEMBRARO** Laŭ la nuna stato AGEI havas 86 membrojn. Dankon al ĉiuj malnovaj membroj pro la pago de la ĉi-jara kotizo.
Ĉu vi deziras membriĝi aŭ eble forgesis pagi por 2009? Jen la kontonumero: Volksbank Schmallenberg, BLZ: 46062817, KNr: 5187110500
Por aliĝilo bv. kontakti nian kasiston: Christoph Krick, Günninghauser Str. 11a, 59955 Winterberg, christof.krick@esperanto.de
Reta aliĝilo estas ĉe http://instrureg.laarts.info/)

**3. NOVA RETPAĜARO** por AGEI: http://esperanto.de/agei Dank' al eksteraj helpantoj mi povis komenci facile redakteblan retpaĝaron. Mi estas dankema por ĉiu rimarko, ideo, enhava plibonigo, ampleksigo. Mi kore dankas al Ulrich Matthias pro la prizorgado de la ĝisnuna paĝaro kaj la promisita plua helpo.

**4. DISKUTLISTO** pri instruado: por vigligi la informinterŝanĝon inter AGEI-membroj, instruantoj, agademaj personoj interesiĝantaj pri instruado de Esperanto, ktp. mi lanĉis diskutliston, kiu ebligas rapidan informfluon kaj rektan komunikadon inter la listanoj. Aliĝi al la listo eblas libere post registriĝo. Legu, kunagu ĉe instru-german@googlegroups.com

**5. EKZAMENOJ** laŭ la KOMUNA EŬROPA REFERENCKADRO
Speciala ekzamen-oferto dum la 25a Printempa Semajno Internacia (PSI, St. Andreasberg, Germanio, 10-17.04.2009)

Bona ŝanco por trapasi la novan UEA-ekzamenon, kiu estas komforma al la internaciaj normoj laŭ la niveloj B1-B2-C1 de la Komuna Eŭropa Referenckadro.
Komparu vian Esperantan lingvonivelon, skrib- kaj parolkapablon al la samaj niveloj en aliaj fremdaj lingvoj.
Aliĝi povas ĉiu, kiu estas pli ol 14-jara. La ekzamenkotizo varias laŭ la landoj kaj niveloj (ĉ. 30-80 eur), pro la subvencio de UEA tiuj ekzamenoj kostas malpli ol samtipaj, samrangaj ekzamenoj en aliaj fremdlingvoj.

Detalojn pri tiuj ekzamenoj vi povas legi sur la paĝaro de http://edukado.net , vidu sub Novaj UEA-ekzamenoj aŭ rekte de
http://www.edukado.net/pagina/NOVAJ+UEA-EKZAMENOJ/22422//
Tie vi trovas informojn pri la postularo, la temaron por la parola ekzameno kaj liston de gramatikaĵoj, kiujn vi devas regi por esti sukcesa.

Speciale trejnitaj ekzamenantoj estos je dispono dum PSI por helpi vian prepariĝon, respondi demandojn kaj poste gvidi la ekzamenon.
Eluzu tiun bonan oferton, investu kelkajn horojn por akiri valoran atestilon (la diplomo en 4 lingvoj raportos pri viaj lingvaj kapabloj.)

Bonvolu indiki, al kiu nivelo vi aliĝas: B1 – B2 – C1
(eblos organizi ekzamenon en iu nivelo nur, se estas ĉ. 10 aliĝantoj.)
Sekvaj ekzamendatoj: dum Malferma Tago en la CO de UEA, Rotterdam, NL, 25-26 aprilo
eble dum GEK-EEU, Herzberg am Harz, 28.05-03.06.
verŝajne dum IJK, Liberec, CZ, 18-25.07
Vian aliĝdeziron sendu al Zsófia Kóródy: zsofia.korody@esperanto.de

**6. KURSOJ, STUDSESIOJ**
Lingvokursoj en ĉiuj niveloj okazas regule en Interkultura Cenrtro Herzberg/Germana Esperanto-Centro, klerigejo de GEA. Datoj en 2009: 10-17 aprilo, 28.05-03.06, 2-9.08, 5-9 oktobro
Detalojn vi trovas ĉe http://ic-herzberg.de
Laŭ komisio de GEA ankaŭ dum 2009 okazos trejnkursoj, seminarioj, la tradiciaj studsesioj por klerigado, pluklerigado

1-3.05. Ĉefpreleganto: Uwe Joachim Moritz
Ĉeftemo: Naciaj kulturoj: Hispanio - aspektoj el kulturo kaj politiko tra la jarcentoj
11-13 decembro: Ĉeftemo: Esperanto-literaturo, verkoj de Zamenhof kaj pri Zamenhof
Dec. 12: Zamenhof-festo okaze de la 150a datreveno de la naskiĝo de L.L. Zamenhof

**7. LIBROJ/GAZETOJ**
Aperis libro kun serioj de testoj en niveloj B1-B2-C1 por prepariĝo al la novaj UEA-ekzamenoj. Titolo: Esperanto de nivelo al nivelo. Detaloj: http://www.edukado.net/katalogo/22596
Aĉetu, mendu ĝin por 10 EUR ĉe Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg 37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6, T: 05521-5983, esperanto-zentrum@web.de

JUNA AMIKO estas interesa revuo por komencantoj, lernantoj de Esperanto. Ĝi enhavas multajn facilajn legaĵojn, rakontojn, ŝercojn, enigmojn, poemetojn, ktp., bone utiligeblajn helpmaterialojn kaj por lernemuloj kaj por instruantoj. Abonprezoj por 2009 restas la samaj.
14 EUR por tri 52-paĝaj numeroj, aŭ po 11 EUR por mendoj de tri aŭ pli da ekzempleroj sendendaj al unu adreso. Peranto:• Interkultura Centro Herzberg, 37412 Herzberg, Grubenhagenstr. 6, esperanto-zentrum@web.de

**8. ILEI-KONFERENCO**: 17-25. julio, Krakovo, Pollando
Ĉeftemo: La pedagogio de Esperanto antaŭ la defioj de interkultura komunikado
Programplano:
Interkona vespero - Solena Inaŭguro - Simpozio laŭ konferenca temo - Nokto de Lingvoj kaj Kulturoj - Seminario de E@I - Seminario de lernu! - Seminario de InterKulturo - Aparta programo por universitataj instruistoj - Kunlaborsesioj kun AIS kaj ISAE - Laborgrupoj laŭ diversaj temoj - Kelknivelaj lingvaj kursoj - Programeroj por instruemuloj - Studrondo pri E-literaturo - Prelegoj de partoprenantoj - Riĉa ekskursa programo- Bunta kaj varia kultura programo - Distra programo ĉiuvespere. Detaloj, aliĝilo: http://ilei.info

**9. LA INTERLINGVISTIKAJ STUDOJ** de UAM, Poznan kaj ILEI decidis kunlabori en la formado de esperanto-instruistoj, kiu delonge atendis solvon. La kontrakton inter la du institucioj subskribis la gvidanto de la Studoj, d-ino Ilona Koutny kaj la dekano de la Novfilologia Fakultato de UAM, prof. Jozef Darski, vicdekano prof. Jacek Witko, aliflanke Zsofia Korody nome de ILEI. Enkadre de la komuna programo kaj formado estas ebleco de septembro aliĝi al la unujara metodika kurso. Detalojn bv. peti de
d-rino Ilona Koutny, akademiano, gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj
Universitato Adam Mickiewicz, al. Niepodleglosci 4, PL-61-874 Poznan, koutny.ilona@gmail.com
T: +48 61-829-36-75, hejme: +48 61-872-83-09 http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html

**10. TORPEDO-5**: 9-12 oktobro en Herzberg am Harz: Tiiuj pedagogiaj tagoj ĉiam kun aliaj allogaj temoj jam fariĝas tradiciaj kaj ĉiam pli kaj pli internaciaj. Tiu kunveno estos grava kaj por spertaj instruistoj, kaj por tiuj, kiuj ŝatus ekkoni pli multon pri efika instruado de Esperanto.
Ĉeftemoj en la jubilea konferenceto:
1. Historio de instrumetodoj
2. Renkonto kun aŭtoroj de lernolibroj kaj vortaroj
Partoprenkotizo: ĝis 31.05. 35 EUR, 01-06-31.08. 40 EUR, poste 45 EUR
Aliĝu ĉe: Zsofia Korody, 37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6, T: 05521-5983
zsofia.korody@esperanto.de

Dezirante belan printempon, sukcesan lernojaron, agrablajn Pasko-festojn:

Zsofia Korody